

Pri la neologismoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 657, 1983.01.27 & 29

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan jaron, kiam ni memorigis al la aktiveco de Edmond Privat honore al la dudek jaroj de porradia laboro, kiun ni havis kiel posteuloj de la granda esperanto-pioniro, ni rimarkis, ke la analizo, kiun Edmond Privat faris pri la evoluo de esperanto, restas aktuala. Aŭskultanto el Jugoslavio, s-ro Mihelic Lucijan loĝanta en la urbo Rovinj tute ne estas samopinia. Ni citas lin: "En via elsendo pri Edmond Privat vi diris, ke lia analizo de la evoluo de esperanto estas ankoraŭ aktuala. Mi opinias, ke ĝi ne plu estas aktuala, ĉar unu tendenco (neologismoj, imitado de la okcidentaj lingvoj, itismo kaj aliaj malregulaĵoj) tute superas la alian (elpoluradon de internaj eblecoj de la lingvo)." (Fino de la citaĵo).

A.- Ni instigas nian jugoslavan aŭskultanton atente relegi la ĉapitron, kiun Edmond Privat dediĉis al "la evoluo de la lingvo" en sia **Historio de la Lingvo Esperanto**. Li konstato, ke por Edmond Privat la reala forto de esperanto estas ĝuste la kapablo ekstreme limigi la asimiladon de neologismoj profite al la memkreo de novaj kunmetaĵoj. Edmond Privat eĉ parolas pri forto, kiu elŝprucas en esperanto per abunda kreo de novaj kunmetaĵoj. Por li la sufiksoj, tiel glacie mortintaj en multaj naciaj lingvoj, vivegas en esperanto kaj ebligas tujan esprimfrapon. Kaj li konstato, ke spritaj oratoroj eltiras multan efikon el tiu konstanta kreebleco. Kaj Edmond Privat konkludas, ke en tiu konstanta kreebleco kaj en la stila libereco kuŝas tio, kion oni povas nomi la vivan ĉarmon de esperanto. Tion ĉi li asertas post atenta analizo de la dueco, kiu ekzistis en la lingvo ekde ties naskiĝo: aŭ oni neologismemas, aŭ kontraŭe oni ĉerpas el la lingvo mem por forĝi la novismojn. Tiu dueco ekzistas fakte en ĉiuj lingvoj.

Cl.- Estus tre interese fari atentan studon koncerne la sorton de la proponitaj neologismoj, por ekzameni kial ili malfacile rezistas kontraŭ ilia esperantigo. Mi donos kelkajn ekzemplojn. Kiam naskiĝis la maŝinoj, kiujn oni neologisme nomis *komputeroj*, *komputeroj* aŭ *komputoroj*, oni bezonis vorton, sed malfacile unu el ili venkis. Kontraŭe la jam ekzistanta verba elemento **komputi**, iom post iom sin trudis. Hodiaŭ en la plimulto de la teknikaj verkoj, kontraŭe al la difinoj de la Plena Ilustrita Vortaro, oni parolas pri **komputilo** por priskribi elektronikan aŭtomaton, kaj la termino *komputero* montriĝas Waringhiena mortnaskito, kiel aro da aliaj teknikaj PIV-aĵoj. La fakuloj ĉesas esti *komputeristoj* por fariĝi tute simple **komputistoj**.

A.- Kaj la Waringhiena monstro *komputatoro*, kiu estis sinonimo de *komputero* en PIV restis monstro, kiun neniu teknikisto pri **komputado**, kaj ne *komputerado* aŭ *komputatorado* uzis.

Cl.- Sed por esperanto ekzistis problemoj. La verbo **komputi** signifis "mezuri per nombroj la kvanton de kontinua fluo aŭ la unuojn de ripetiĝanta fenomeno kaj adicii ilin." La ekzemploj donitaj estas "Komputi la uzatan gason, elektron; horloĝo komputas la tempon; oportuna ilo por komputi la paŝojn." Kaj oni tiam parolis pri akvokomputilo, gaskomputilo, elektrokomputilo, komputilo pri radioaktiveco, Ktp.

A.- Por la lingvopuristoj la uzo de la elemento **komputi** por la nova koncepto ne estis akceptebla, tial ili forĝis neologismon *komputero*. Sed la lingvouzo preferis doni al la verbo **komputi** novan signifon. Eble tiu ĉi lingvouzo sentos la neceson distingi inter la malnova

signifo de komputilo. Ĝi tiam verŝajne diros elektromezurilo, gasmezurilo, kaj iom post iom la malnova formo arkaiĝos profite al la moderna.

Cl.- La neologismemuloj ĝenerale ne komprenas, ke esperanto estas memstara lingvo, kies latenta dinamismo estas ege potenca, kontraŭe al tio, kio okazas en la franca lingvo. El tiu ĉi lingvo esperanto ĉerpis la neologismon **polucio**, kiam la riveroj komencis ŝaŭmi kaj malbonodori. Sed jam nun la ĵurnalistoj preferas la pli trafan terminon **poluo**. Ili raportas pri **poluita** rivero kaj ne pri *poluciigita* rivero, pri la **poluo** en la grandurboj, kaj ne pri la *polucio*. Elemento kiel *polucio* povis vivi en la lingvo, tiom longe kiam ĝi restis medicina aŭ biologia termino por paroli pri la nevola elfluo de spermo sen koito. Sed tuj kiam ĝi eniris la buŝojn de la ĉiutaguloj, ĝi devis perdi parton de sia artefariteco, tiun 'ci', kiu memorigis ĝian francecon.

A.- Ni konas en esperanto la saman evoluon ĝuste kun la elemento *evolucio*, al kiu la esperantistoj preferis la lingve pli konvenan **evolui**, el kiu oni formas **evoluo** anstataŭ diri *evolucio*.

Cl.- La unuaj esperantistoj parolis pri *civilizacio*, *imperialismo*, *nacionalismo*, dum la hodiaŭuloj diras **civilizo**, **imperiismo**, **naciismo**. Sur iliaj lipoj la lingvo estas vivanta, dum la plumoj de la pioniroj imitis la formojn ekzistantajn en la ĉefaj okcidentaj lingvoj. Iliaj neologismoj arkaiĝis profite al novismoj tipe esperantaj.

A.- Sed tio povis okazi nur per vivo de la lingvo. Kio konvenas al la okuloj, tio ofte malplaĉas al niaj parolorganoj. Tiel estas por multaj neologismoj, imitantaj la okcidentajn lingvojn, kiuj svarmas en nia dika Plena Ilustrita Vortaro. Ili ŝatas nenecesajn lingvajn balastojn, kiujn la parolantoj rapide forlasas: **individuo** naskis la novismon **individuismo** anstataŭ la neologismon *individualismo*, kiu blinde imitis la franclingvan paron *individu* kaj *individualisme*, la silabo 'al', kies signifo estis nula, estis **okcidentaĵo**, *okcidentalismo* estus skribintaj la neologismemaj pedantuloj, kiuj nomis tiujn ĉi por ili naturajn vortojn *naturalismojn*. Kaj la lingvistoj riproĉis, ke esperanto ne estis sufiĉe *naturaleca*, dum ĝia evoluo montras, ke ĝi tute nature disvolviĝas, laŭ interna dinamismo neniel dependa de tiu, kiu esprimiĝas en la okcidenteŭropaj lingvoj, el kiu ĝi ĉerpis la plimulton de siaj vortelementoj.

Cl.- Ekzistas dialektiko absolute necesa en ĉiu lingvo inter la eksteraj influoj kaj la internaj fortoj. La eksteraj influoj esprimiĝas en nia lingvo per la forĝado de neologismoj kaj ilia uzo fare de iliaj proponantoj. Sed ekzistas aliaj lingvo-praktikantoj, kiuj neniel sentas sin ligitaj al tiuj proponaĵoj. Se la koncernaj vortoj estas utilaj, ili eniros la lingvon obeante ties internajn leĝojn. Ĉio balasta malaperos.

A.- Sinjoro Mihelic Lucijan same kiel la kontraŭneologismemuloj ne timu. Nur vivos el tiuj vortoj la formoj, kiuj montriĝos lingve necesaj. La aliaj reprezentos karakterizaĵojn, kiuj ebligas datumi tekston, kiel la *televizio*, *kaseto* kaj *ĉaleta* de PIV, kiuj fariĝis en la parola uzo de esperanto **televido**, **kasedo** kaj **ĉaledo**. De neologismoj ili fariĝis novismoj necesaj kaj vivantegaj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al ĉiuj: ĝis reaŭdo!